

Verschiĝnt maandelijks
Zeventiende jaargang
Nummer 7-8 (193-194)
JULI-AUG. 1950

Vertegenwoordiger in Nederland:
L. E. E.
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabe-soone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

La forto de la nombro

Rerigardante trans periodon de kelkaj jardekoj ni povas kun ĝojo konstati, ke la Esperanto-movado konsiderinde kreskis kaj precipe ke la sinteno de la amaso, kiu staras ekster niaj rondoj, tute ŝanĝiĝis. Preskaŭ ĉie nia ideo ne nur estas konata, sed oni ĝenerale konfesas la utilon de Esperanto kaj favoras ĝian enkondukon en la lernejojn.

Tiu enkonduko tamen efektiviĝos nur, kiam ni povos montri sufiĉan potencon al la koncernaj aŭtoritatoj. En tiu rilato estas ĝojiga fakto, ke ne nur la Esperanto-organizaĵoj batalas por la instruado de Esperanto, sed ankaŭ la fakaj instruistaj organizaĵoj.

Aliflanke estas grava malhelpo, ke la nombro da organizitaj esperantistoj estas relative malgranda. La kaŭzon oni facile trovas en la fakto, ke la postuloj por fariĝi esperantisto, estas tre severaj. Al ĉiu alia societo oni povas tuj aliĝi, se oni simpatias ĝian celadon kaj konsentas pagi la ŝuldatan kotizon. Al Esperanto-asocio oni povas aliĝi nur, se oni (pli aŭ malpli perfekte) ellernis la lingvon. Kaj nur malmultaj el tiuj, kiuj simpatias kun la ideo de internacia lingvo, estas pretaj kaj disponas la tempon por entrepreni tiun taskon.

Estas vere, ke favorantoj de nia idealo povas aliĝi kiel simpatiantoj aŭ donacantoj, sed tiamaniere ili akiras nenian membrecajn rajtojn. La tempo venis, ke ni devas almenaŭ pristudi la eblon, suriri alian vojon, formante organizaĵon kun samrajtaj membroj, kiuj estas dividitaj en simpatianta kaj praktikanta grupoj.

Samtempe ni atentu la kampon de la neorganizitaj esperantistoj, kies nombro estas multoblo de tiuj, kiuj aliĝis al iu Esperanto-asocio. La sperto bedaŭrinde montris, ke eĉ inter tiuj, kiuj faras ekzamenon en nia lingvo, troviĝas pluraj neorganizitoj. Ili do volas praktiki Esperanton, sed ne morale kaj financa kontribui al organizoj, kiuj jam kreis la eblon praktiki ĝin kaj kiuj daŭre pligrandigas la eblojn de praktikado, ĝis ĝenerala oficiala akcepto de Esperanto faros tiun laboron superflua.

Same ni bedaŭras, ke multaj samideanoj post kelkajara membreco forlasas niajn vicojn. Multaj en sia koro restas fervoraj esperantistoj, sed ili havas tiom da intereso, ke Esperanto iom post iom estas flankenŝovata kaj kiam oni devas ŝpari monon, kotizoj kaj abonoj estas la plej oftaj viktimoj, ĉar ili estas libervolaj.

Krome ni konstatis, ke eĉ en idealistaj rondoj oni ne facile elspezas « ion por nenio ».

Eksigletoj ofte tekstas: « Bonvolu trastreki mian nomon, ĉar mi ne plu havas tempon ĉeesti la kunvenojn ».

Ni simple ne povas permesi al ni la daŭran dizertadon de membroj, kiuj estas la sango de nia movado. Ekde nun ĉiuj niaj grupoj dediĉu specialan atenton al la eksigletoj. Se ili ne povas aŭ ne volas resti aktivaj, ili restu almenaŭ simpatiantoj.

Plie ni serĉu vojon reakiri en

FL. L. E. - Kongreso 1950

Sabaton la 27-an de majo je la tria posttagmezo akurate oni atendis la kongresanojn. Iom post iom ili alvenis, estis bonvenigitaj de la lokaj komitatanoj, akceptis siajn kongresdokumentojn, forportis ĉion superfluan al siaj ĉambroj, kaj interkonatiĝis kun la aliaj kongresanoj aŭ salutis la jam konatajn en la librostando de la FL.L.E. kies kutima vendistino ĉi-foje pro hejmaj cirkonstancoj estis malmalhelpata. La L. K. K. havis la bonan ideon, rezervigi ĉambrojn por ĉiuj kongresanoj en la sama hotelo, kio evitis kuradon tien kaj ree. Ĉio estis bone aranĝita, do neniu bezonis serĉi.

Pri kongreso, eĉ la plej rigida kaj serioza, oni ĉiam povas rakonti anekdotojn. En Oostende, la frualvenintoj jam tuj sekrete ridetis aŭdante ke la intereso librostando de Flandra Esperanto Instituto nur enordigis post perforta malfermo de la libro-kofro. Tiel ja okazas kiam la direktoro de la Instituto forgesas la ŝlosilon!

Jam je la 17-a horo, la unua kunsido de la kongreso por la ĵurnalistoj invititaj de la Ligo! Drs Roose al ili donis

ĉar lia pastra moŝto DE MAYER akurate je la naŭa komencis la Sanktan Meson en la kapelo de la Dominikanoj. Multaj ĉeestantoj, inter kiuj ankaŭ neesperantistoj, aŭskultis la esperantlingvan predikon.

Komprenoble ke nur poimé la geesperantistoj kolektiĝis dimanĉmatene por kune iri al la urbdomo kie okazis la oficiala akcepto fare de la urbeŝtaro kaj poste ankaŭ la jarkunveno.

Ĉirkaŭ la 10.30 h. la modernsila salonego de la Oostenda urbdomo — por la amatoroj de kuriozaĵoj mi mencias ke estis la salono kie okazas la geedzaj solenoj — pleniĝis kaj la Esperanto-zumado (almenaŭ en kelkaj anguloj) tuj silentiĝis kiam la Oostenda skabenaro envenis por la oficiala akcepto. La skabeno de Instruado bonvensalutis la ĉeestantaron sen eksterordinara entuziasmo. Rilate al la Esperanto movado meĥ mi havis la impreson ke la skabeno nur pro forma aŭdigis kelkajn bonintencajn vortojn. Des pli lojala kaj motivita estis la dankesprimoj de S-ro D'Haenens, la L.K.K. prezidanto. Ni tamen devas gra-



La Kongresanoj ridetas post la afabla akcepto fare de la Urbeŝtaro kaj... pro la finiĝo de la Jarkunveno!

klarigojn pri la kongreso, parolis pri la programo kaj ĝiaj plej interesaj punktoj kaj skizis la Esperanto-movadon. Ankaŭ la ligo sekretario kaj vicprezidanto Cortvriendt aldonis kelkajn vortojn. Ĉeestis: reprezentantoj de « Standaard » — « Het Volk » — « Gazet van Antwerpen » — « Volksgazet » — « Libre Belgique » — « Het Vrije Vissersblad » — « Het Laatste Nieuws » — « Le Soir » — « Het Nieuwsblad ».

Je la 20-a horo oni komencis sin prepari por iri al la salono en *Laiterie Royale* por la balo. Tiu salono situas meze en parko, kaj estis preskaŭ kreita por nia celo. La ronda salono prezentis belegan dancejon kaj ĉirkaŭ ĝi multajn, komfortajn sidlokojn. Bonega orkestro baldaŭ kaŭzis ĝeneralan gajecon, kaj sprita ceremoniestro ofte ridigis la tutan kunvenintaron. Lia eltrovemo sur tiu kampo surprizis ĉiujn, kaj ŝercaĵoj faris la ceteron por transserĉi la komence iom sindetenan ĉeestantaron en gajecon societon. Ne mirige ke preskaŭ ĉiuj ne foriris, antaŭ ol la orkestro donis la signon de la fino. La plej granda parto de la jam mallonga nokto intertempe jam forpasis.

Por multaj do la ripozo ne estus longa,

nian vicojn la malnovulojn, kiuj nun staras flanke. Ni traserĉu malnovajn membrulitojn kaj kontaktu kun la eksigletoj, konvinkante ilin ke ni bezonas ĉies fortojn por la fina venko.

En nia mondo la nombro estas potenca. Tial ni zorgu, ke ĉiuj rezertoj de nia armeo estu mobilizitaj por tiel impresi la publikan opinion kaj la aŭtoritatojn.

H.J.B.

(Daŭrigo p. 3.)

SOMERAJ KURSOJ 1950

Pli kaj pli proksimiĝas la 27-a de julio, la tago en kiu la bela konferenco « Oolgaardthuis » en Arnhem (Nederlando) malfermos siajn pordojn por gastame akcepti la multajn esperantistojn, kiuj deziras profiti la okazon pasigi malmultekostan kaj agrablan ferion en Esperantujo kaj pro tio aliĝis al la someraj kursoj, organizataj de « La Estonto Estas Nia » kaj FL.L.E.

Arnhem, pro siaj belaj ĉirkaŭaĵoj, estas multvizitata urbo. Sed homoj, kiuj havas libertempon, volas ne nur ĝui belan naturon, sed krome distri sin. Ĉiujare V.V.V. (la loka unuigo por fremdultrafiko) tiucele aranĝas logan programon kaj ĉi-jare la granda nacia ekspozicio « Meĵloŝtono 1950 », kiu okazos en la parkoj Sonsbeek kaj Zijpendaal kaj kiu donas bildon pri la progresado de Nederlando post la liberigo en 1945, certe estos grava logilo. Pri tiu vizitinda ekspozicio ĉiuj sekcioj jam ricevis detalan cirkuleron. Ne ploru, se vi ne havas tempon aŭ sufiĉe da mono por ĉeesti la internacia kongreson de Esperanto en la lumurbo Parizo, ĉar la arnhemanoj transformos sian urbon por vi en veran « lumurbon » en kiu oni eĉ konstruos Eiffelturon kun du galerioj! Famkonataj artistoj kreos la necesan « Parizan » sferon kaj ĉiamaniere vi povos amuziĝi! Do, se vi ne povos vojaĝi al Parizo, almenaŭ vizitu la Arnhemano « Parizan », aliĝante al la internaciaj someraj kursoj, gvidotaj de s-ino A.M.v.d. Wal-Brethouwer kaj s-roj Th. v. Gindertaelen, A. Weide kaj C. B. Zondervan. La kurskotizo (g. 36,—) inkluzivas la restadon dum la tuta kurso kaj ĉiujn manĝojn kaj ekskursojn! Vespere okazos diversaj prelegoj i.a. de d-ro W. Manders. Doliamos por s-ino R. Köhler-van Ghelder, kiu en Groningen rikoltis grandan sukceson. Ĉu vi estas baŭbutanta komencanto? Ne grave! Perfektigu vian scion en la konversaciaj kursoj! Ĉu vi jam posedas diplomon A aŭ eĉ B? Tiukaze certe interesos vin la seminarioj kaj literaturaj lecionoj kaj la prelegoj.

Do, petu la detalan senpagan prospekton, enhavantan ĉiujn deziratajn informojn de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer kaj aliĝu, pagante la duonon de la kurskotizo (g. 18,—) per postĝirkonto 70215 de Adm. Zomer-Cursus « L.E.E.N. », Sweelinckstraat 2, Deventer. La reston vi povos pagi tuj post alveno en « Oolgaardthuis ».

REINAŬGURO DE E-MONUMENTO

Kiam ni la 29-an de majo post iom longa kaj emiga vojaĝo alvenis en Oude Schild (Tekselo), vilaĝo, kie la vaporsippo el Den Helder alboriĝas, f-ino A. Apaans kore bonvenigis nin. Per aŭtobuso ni iris al Den Burg, kie jam geesperantistoj el diversaj lokoj ĉeestis. Post iom da ripozo ni iris al la loko, kie staras la monumento kaj ĉe nia alveno ni vidis, ke jam granda amaso da homoj estas kolektiĝinta ĉirkaŭ la monumento.

S-ro Th. Tiessen, prezidanto de la rekonstrua komitato komencis la solenaĵon per parolado, en kiu li per kortuŝaj vortoj skizis la historion de la monumento kaj la agojn de s-ro Duinker tiurilatajn (vidu la artikolon « E-monumento rekonstruita » sur paĝo 1-a de la antaŭa numero de nia organo). Bonveniginte kelkajn oficialajn personojn, inter kiuj troviĝis s-ro H. Th. Rooswinkel kiel registara reprezentanto, la urbestro kaj skabeno de Den Burg kaj la edzinoj de s-roj Duinker, li petis la gefilojn de s-ro Joh. Duinker, forpreni la flagon kiu kovris la memortabulon pri la rekonstruo, masonitan en la monumento, kaj deklaris per tiu ago la monumento reinaŭgurita.

Poste parolis s-ro H. Th. Rooswinkel, s-ro A. Cseh, s-ro F. Weeke kiel reprezentanto de L.E.E.N. kaj ĝia ĝia sekcio kaj reprezentanto de FL.L.E. kaj ĝia Zaandama sekcio.

Post la solenaĵo de la reinaŭguro oni iris al la tombo de la fratino Duinker, kie s-ro Tiessen deklamis. F-ino Spaans metis florbukedon sur la tombon.

La tuto estis solena kaj inda manifestacio ne nur honore al d-ro L. L. Zamenhof, sed ankaŭ al la fratino Duinker.
F. WEEKE.

OBSERVOJ LA STUDANTO



PARFUMITA MUZIKO.

Savita antaŭ pereo la brava esperantista familio Josioka-Kingan en la Japana urbo Kanazaŭa decidis ser- vi al la rekonstruo de paca mondo per fabrikado de... «sufiĉe bonaj kudromaŝinoj».

La rilatanta prospekto kiu atingis min, bilde montras la markon de l'paca maŝino: virino kun kokinaj kruroj kaj pa- va vosto.

Tamen la prospekto klarigas ke tiu seninstrumenta estajo estas la Dia mu- zikisto Gandarva kiu, sin nutranta per parfumoj, ĉarmas la orelojn de la Dioj en Sumeru, la plej alta regiono de Hima- lajo.

Mi varme rekomendas la kudromaŝi- non al niaj samideaninoj kun delikata flarsento...

Uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer:

- Li diris, ke li estos ĉi tie je la naŭa (horo), sed je la deka li ankoraŭ ne alve- nis.
- Studu kiel eble plej multe, por ke vi sukcese povu partopreni la ekzamenon (en la ekzamenon).
- Estas nepre necese, ke oni pli-atentu la problemon (dediĉu pli da atento al la problemoj) de internacia lingvo.
- Ne renkontinta lin ni devis reiri hejmen.
- Li asertas, ke li laboras laŭpove, sed se tio estus vera, li ne akirus tiajn malaltajn poentojn.
- Mi vidis lin promeni (promenanta) kun sia plej aĝa filo kaj opiniis, ke li aspektas sana.
- La dudek unuan de marto komenci- ĝas la printempo; la tago tiam estas same longa kiel la nokto.
- Bone pripensu antaŭ ol traduki iun frazon kaj korektu la trovitajn erarojn.

- Hieraŭ tri bovinoj estis melkataj de la kamparano.
- Per ŝipoj multaj varoj estas trans- portataj eksterlanden.
- En la ekzameno montriĝis, ke la lingvo ne estis bone lernata de kelkaj kandidatoj.
- Se de vi estus bone atentate, ne es- tus farataj de vi tiom da eraroj.
- Baldaŭ la someraj kursoj en Arn- hemo estos vizitataj de multaj esperan- tistoj.

- Foriri senrevene. 2. Mia kapo tur- niĝas! 3. La ferio bone efikas al mi. 4. Reakiri la spiron. 5. Eltrovi la veron. 6. Noti ion en la memoro. 7. Kvitiĝi la konton. 8. Meti ĉion sur la karton. 9. Veni antaŭ ies okulojn. 10. La plej ele- mentaj reguloj. 11. Alpremi iun al la mu- ro. 12. Vivi larĝe kaj lukse. 13. Kapti iun ĉe la freŝa faro. 14. Kavigintaj van- goj. 15. Kuncheniĝo de cirkonstancoj. 16. Li ne bridas sian langon. 17. La unua renkontita kaŝejo. 18. Li estas impertin- ta kiel kvar. 19. Ne gravas. 20. La polvsuĉilo ne funkcias.

Unu el la plej misteraj fenomenoj estas la gravito, kiu estas kaŭzata de (kio baziĝas sur) la altira forto de la tero. Sed nur malmultaj homoj scias, ke an- kaŭ la altira forto de la tero ne ĉie es- tas la sama. Tiun fakton unufoje ob- servis la franca astronomo Richer en la jaro 1672. Li faris en tiu jaro vojaĝon de Parizo al Cayenne kaj portis kun si ankaŭ sian pendolhorloĝon. La horloĝo, kiu en Parizo precize funkciis, malra- pidis en Cayenne kvankam en ĝia meka- nismo neniu ŝanĝo okazis. La tiutempajn pendolhorloĝojn reguligis ne risortoj, sed nur pezaj objektoj, do la altira forto de la tero. Kiam Richer revenis en Parizon, li kun miro konstatis, ke la horloĝo denove bone funkciis. Fine li kompren- nis, ke la altira forto de la tero kreskas kun la proksimeco al la poluso kaj malkreskas kun la proksimeco al la ekvatoro. En la polusaj regionoj ekzem- ple ĉiu pendolhorloĝo devas rapidi (an- taŭi), ĉar tie la altira forto estas la plej granda. La kaŭzo konsistas en tio, ke la polusoj estas pli proksimaj al la centro de la tero ol la ekvatoro, kaj ju pli proksima iu objekto estas al la cen- tro, des pli granda estas la ĝin altiran- ta forto. Alia kaŭzo estas la centrifuga forto, kiu ĉe la ekvatoro estas konside- rinda sed ne ekzistas ĉe la polusoj.

La somero ne estas la plej taŭga se- zono por studrubriko. Pluraj sekcioj en la someraj monatoj tute ne kunvenas. Eble la anoj daŭrigas la kontakton per ekskursoj, eble ne. Pluraj gesamideanoj dum kelka tempo vivas en «Esperantu- jo» sed ne ĉiuj estas tiel feliĉaj, ke ili povos viziti la somerajn kursojn en Arn- hem kaj Helsingör aŭ la kongreson en Parizo. Sed por tiuj, kiuj tamen deziras ion studi en pluvaj tagoj, ankaŭ ĉi foje mi publikigos novajn taskojn. Al ĉiuj gelegantoj mi deziras agrablajn feriajn tagojn kaj esperas revidi aŭ pli bone de- nove skribi renkonti ilin freŝaj kome- ce de septembro.

Ni komencos per la skriba tasko de la A-ekzamenoj en Amsterdam kaj Zwolle. Ter vertaling:

- Mevrouw Boras zou met de trein naar de stad gaan om een nieuwe hoed te kopen. 2. Zij vroeg haar man, of hij haar geld daarvoor wilde geven. 3. Glim- lachend voldeed deze aan haar verzoek en legde een bankbiljet van vijf en twintig gulden op tafel. 4. Drie kwartier later zat zij reeds in de trein. 5. Haar enige medereiziger zat in een hoekje bij het raam en dommelde wat. 6. Mevrouw Boras vond de coupé erg warm en na enige tijd legde zij haar boek en tas op de bank en ging even weg om zich wat te verfrissen. 7. Toen ze in de coupé terugkwam, opende ze haar tas en zag haar portemonnaie openstaan! 8. Het biljet van vijf en twintig gulden was weg. 9. Mevrouw Boras werd bleek van schrik; zij zocht overal, maar alles was

- vergeefs. 10. Op de andere bank zat nog steeds de andere dame, en sliep rustig. 11. Maar plotseling bedacht mevrouw Boras: «Zou zij misschien wakker ge- worden zijn toen ik weg was?» 12. Toen zag zij de tas van de slaapster op de bank liggen. 13. Mevrouw Boras aarzel- de even, maar toch greep ze die tas. 14. En daar, tussen enkele brieven... vond zij een bankbiljet van vijf en twintig gul- den. 15. Juist zoals zij dacht! Zij deed het geld in haar eigen tas en vroeg zich af, of zij de politie zou waarschuwen. 16. Maar nee, nu zij haar geld terug had, was ze tevreden. 17. 's Middags, toen zij thuiskwam met haar nieuwe hoed, vond ze op tafel... het bankbiljet, dat zij ver- gotten had mee te nemen!

Povas esti, ke vi okaze de ekskurso renkontos iun beston, kiu deziras kon- takti kun vi. Tamen por esprimi siajn sentojn la bestoj produktas sonojn tre diversajn, ĉar la homo parolas, sed la hundo..., la porko..., la grilo..., la abe- lo..., la kato..., la rano..., la bovo..., la serpento..., la kolombo..., la cikonio..., la muso..., la virkoko..., la ĉevalo..., la du- po..., la korvo..., la kokino... kaj la fi- ŝo...

Traduku jenajn esprimojn:
Het resultaat viel me mee; z'n knie- en knikten; de mouwen opstropen; de deur wagenwijd openen; ik zal u niet ophouden; arbeid adelt; iets op zicht sturen; de hoop koesteren; nood breekt wet; iemand 't hoofd op hol brengen; klein behuisd zijn; een bereisd man; een onbehaaglijke stilte; bij iemand in de leer zijn; een spaak in 't wiel steken; een hautaine glimlach; oefening baart kunst; luilekkerland; de gelegenheid maakt de dief.

Korektu la jenajn frazojn sed ne faru novajn erarojn:

- La kunveno ĵus estis komenonta, kiam agento envenis la salonon kaj arestis la parolonton.
- Kiam mi havus sufiĉe kuraĝon pa- roli Esperanton, mi certe visitus la kongreson, ĉar mi konas ĉiujn ekcerzojn el mia lernolibro el mia kapo.
- Kun konvinkiga parolado li suk- cesis akceptigi sian proponon.
- Ŝajnas al mi necesa, ke vi diras la veron.
- Ĉio bone konsiderite mi kredas, ke tamen vi pravas.
- Mi ŝuldis lin dudek unu frankoj kaj tial donis al li unu kaj duonan guldenon, ĉar unu guldenon havas la saman valo- ron ol dek kvar frankoj.
- Li petis min, ke mi helpos lin, sed mi mankis la tempon fari tion.
- La ŝlosilo ne pli estis uzbla ĉar ĝi estis tute rustita.
- Tiu substanco estas tre veneniga; la mila parto de tiu kvanto povas kaŭzi la morton.
- Plene da kuraĝo la vicprezidanto anstataŭanta la prezidanto dum sia mal- sano komencis sian taskon.

Provu vian vortscion, ne konsultante vortaron kaj elektu la ĝustan difinon de jenaj vortoj:

- Torako estas a) armilo b) busta par- to de la korpo c) alkohola trinkaĵo.
Putoro estas a) fluajo produktiganta en abscesoj b) sekshontemo c) besto.
Barĉo estas a) speco de ŝipo b) acida supo c) kemia elemento.
Eskarpo estas a) teksaĵo servanta por subteni vunditan brakon b) fiŝo c) in- terna deklivo de fortifikajo.
Semantiko estas a) lingvistika termi- no b) infekta malsano c) aparato por dissendi optikajn signalojn.
Sepalo estas a) speco de rezino b) fo- lio de florkaliko c) grenspeco.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 10 Augustus aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; voor Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

DIVERSAJDOJ

K.E.L.I. (Kristana Esperantista Ligo Internacia) aranĝos internacian krista- nan konferencon en La Rochette 29 VII — 5 VIII. Kostoj por restado kaj man- ĝoj 4200 fr. fr.: por tiuj, kiuj kunportas proprajn litotukojn nur 3900 fr. fr. Infor- mojn donas s-ro H. Dabezies, 2 avenue Debidour, Paris XIX, Fr.

Jam proks. 50 geinstruistoj aliĝis al la feriaj kursoj, kiujn la oficejo «Esperan- to ĉe la Instruado» organizos 17 — VII — 29-VII en la populaltlernejo «Over- cinge» en Havelte.

Esperanto-Asocio de Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo, Wukung, Shen- si, Ĉinujo petas alsendon de E-libroj kaj periodaĵoj, precipe agrikulturaj kaj bio- logiaj por starigi bibliotekon. Ĝi rekom- pencos ĉiun kontribuanton per propraj eldonaĵoj.

MEJLO-ŜTONO 1950

Nederlandanoj kaj eksterlandanoj de ĉiuj rangoj kaj klasoj, ni insiste invitas vin viziti en la venontaj someraj mona- toj nian nacian ekspozicion «MEJLOS- TONO 1950», kiu estos tute alie orga- nizata ol la ekspozicioj, kiujn oni ĝis nun aranĝis en Nederlando.

«Mejloŝtono 1950» ja estiĝis el kon- sideroj, baziĝantaj nur sur idealismo kaj koncerne al la projekto kaj ekspluatado, jam de la komenco, ĉia ideo pri komer- co estas plene eliminata, eĉ tiagrade, ke la komunumestraro jam anticipe desti- nis eventualan profiton por fortigo de la kasoj por la batalo kontraŭ la kancero kaj la «fondaĵo 1940-1945».

Nia «Mejloŝtono» fariĝos de la ko- menco ĝis la fino altnivela socia faro, efektivigita pere de intima kunlaboro inter la registaro, la komunumestraro de Arnhem kaj la loĝantoj de tiu urbo; so- cia faro por kies plenumo Arnhem ofe- ras la parkojn, konstruas kaj aranĝas la ekspozicion, NUR la registaro ensendos la ekspoziciaĵojn kaj multmiloj da ar- nhemaj loĝantoj libervole kaj senpage prizorgos por ni la tagajn servojn.

Samlandanoj kaj eksterlandanoj, venu kaj konvinku vin mem pri tio, sed antaŭ ĉio vizitu la ekspozicion «Mejloŝtono» por rigardi en la registaraj pavilonoj la ensendaĵojn, kiuj estos la animo de la ekspozicia laboro kaj estis elektataj de kompetentuloj en la departementoj kaj ĉiel bildigataj de la plej famaj artistoj, kiujn nia lando sur ĉi tiu tereno posedas.

Do, ne lemas pri ciferoj, nek pri sta- tistikoj, sed pri granda belega speka- klo donata laŭ maniero komprenebla por ĉiuj, superrigardon pri la miseroj de ni ĉiuj je la 5a de majo 1945a; pri tio, kio poste en la kvin pasintaj jaroj malgraŭ centoj da malhelpaj faktoroj tamen estis efektivegita de kaj por nia popolo, plue pri la malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj ni ankoraŭ nuntempe ĉiam devas lukti kaj fine pri tio, kio povas helpi nin por venki en tiu batalo.

La ekspozicio do ankaŭ estos klopodo, almenaŭ se necese, kuraĝigi nian popo- lon kaj per tio havigi al ĝi kuraĝon kaj fidon al la estonteco.

Jes, kuraĝon kaj fidon al la estonteco, tion ni celas kaj por tio ni laboras kaj ĉi ĉion ni vidas plene akordiganta kun la festo okaze de la unua lustrumo de nia libereco.

En la nomo de la ekspozicia estraro,
Mr. J. Hugés,
Delegita membro.

DOKUMENTA SERVO

Kio okazis ne 1949?

EL DIVERSAJ LANDOJ

Bedaŭrinde ĉi tiu parto de nia kroniko ne estas kompleta, ĉar ne ĉiuj asocioj re- spondis al nia cirkulero kaj kelkaj, kiuj respondis, ne menciis la membronomb- ron. Nia opinio ĉiu asocio devus ĉiujare publikigi en sia organo jarraporton kun la membronombro. Per tio ebligus kon- stati i.a. ĉu la movado kreskas aŭ ne, kaj tio utilis pli ol la raporto pri novaj kur- soj kun la nombro da ekpartoprenantoj! Esperable nia venontjara kronika estos pli kompleta dank' al kies kunlaboro.

ARGENTINO: En tiu lando aperis biografio pri d-ro Zamenhof en formo de romano. Aŭtoro: A. Lopez Luna. S-ano D. Quarello komencis la eldonadon de se- rio de verketoj prigramatikaj sub la ti- tolo: Lernu Esperanton.

AŬSTRUJO: Aŭstria Esperantista Federacio (organo: Aŭstria Esperanto- Revuo), kiu kunigas diversajn tenden- cojn de nia movado kongresis en Graz. 400 partoprenantoj inter kiuj 41 ekster- landanoj. Oficiala akcepto kaj inaŭguro de Esperanto-Placo. Subvencioj: s. 3.000 de la landa registaro, s. 2.000 de la urbo Graz, s. 1.500 de la Laborista Cambro, s. 1.330 de la Fremdultrafika oficejo (pres- kostoj de Gvidlibro).

BELGUJO: Ekzistas du landaj orga- nizo: Flandra Ligo Esperantista kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista kies orga- noj estas resp. Flandra Esperantisto (monata) kaj Belga Esperantisto (du- monata). F.L.E. kreskis je du sekcioj kaj atingis membronombrojn: 398; plie oni varbis 387 simpotantojn kiel «ami- kojn». Kongresis en Gent. Radiostacio Gent elsendis je Zamenhoftago propa- gandan teatraĵon. Pri Belga Ligo man- kas membrociferoj; kongresis Brugge.

BULGARUJO: Pri ĝi konkretaj fak- toj mankas. Internacia Kulturo daŭre aperis, kvankam kun granda malfriugio, sed kiel peresperanta gazeto ne multe in- formis pri la movado. Oni anoncis 32-an Bulgaran Esp. Kongreson, sed raporton ni ne vidis.

BRAZILIO: En Belo Horizonte, ĉef- urbo de la ŝtato Minas Gerais, okazis la 12-a Brazila Kongreso de E., kiu partop- renis ĉ. 300 personoj. La ŝtatestro per- sone ĉeestis. Al la oni ŝuldas subvenciojn de 30.000 kruzeroj (6.000 guld.) Saman subvenciojn donis la urbo, dank' al la sub- teno de la urbestro. Sur placo Esperanto oni metis fundamentan ŝtonon por mo- numento al d-ro Zamenhof. Gazetaro, ra- dio kaj filmo montris grandan interes- ion pri la kongreso. (daŭrigota)

G. P. De Bruyn

De stichting «Vacantie en Vormings- centrum» te Doornspijk, organiseert een Werelddeenskamp voor jongeren 12-19 Aug. Naast sport, wandel- en fiets- tochten; muziekavonden en lezingen o.a. over Wereldfederalisme en een Esperan- to-proefles, te geven door Andreo Cseh. Kampkosten totaal f. 25.— Inlichtingen, mevr. H. Meijers-Kehrer, Gr. Hertogin- nelaan 36 a, Bussum.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.
 Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.
 Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
 Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp
 Cerdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

En Groningen la jarkunveno akceptis favorotizon por gejunuloj malpli ol 21-jaraj. Sekcioj Deventer kaj Leeuwarden jam donis bonan ekzemplon, konsiderinde malaltigante la sekciajn kotizojn por junaj anoj. Se ni estas bone informitaj, la gejunuloj tie ŝuldas eĉ neniom al la sekcia kaso kaj do pagas al la sekcia kaso nur tiom, kiom ili ŝuldas al la ĝenerala kaso de L.E.E.N., nome g. 1,50 ĉiujare.

Ni esperas, ke la aliaj sekcioj imitos tiun ekzemplon por tiamaniere kiel eble plej multe faciligi al gejunuloj la aliĝon al L.E.E.N.

En Groningen ni akceptis plurajn ŝanĝojn en nia ĝenerala regularo, sed ĉar la proponitaj ŝanĝoj troviĝas disce en diversaj numeroj de nia gazeto, ni ĉe-sube mencias ilin, por ke ĉiuj povu konformiĝi sian regularon al la novaj cirkonstancoj :

Algemeen Huishoudelijk Reglement : art. 8 schrappen behalve de eerste drie regels ; art. 15 : „ 1 Februari „ moet zijn „ 10 Januari „ ; art. 19 schrappen behalve de eerste twee regels ; art. 23 : „ een der Februari-nummers „ moet zijn „ het Januari-nummer „ „ voorzien van „ moet zijn „ eventueel voorzien van „ ; art. 29 : het woord „ laatste „ vervalt ; art. 33 eerste alinea : „ 15 December „ moet zijn „ 15 November „ „ 1 Februari „ moet zijn „ 10 Februari „ , de tweede alinea leze men aldus „ De amendementen worden in het Maart-nummer van het verenigings-orgaan gepubliceerd „ ; art. 47 leze men aldus „ Het hoofdbestuur bestaat uit 7 leden. De leden van het hoofdbestuur worden gekozen voor de tijd van 3 jaar. Het eerste jaar treden 2 leden af, het daaropvolgende jaar eveneens 2 en het derde jaar 3, volgens door het hoofdbestuur op te maken rooster, enz. „ ; art. 48 „ eerste December-nummer „ moet zijn „ November-nummer „ ; art. 50 : „ 1 Februari „ moet zijn „ 15 December „ „ eerstvolgende Februari-nummer „ moet zijn „ Januari-nummer „ ; art. 59 leze men aldus „ Huisgenoten, jeugdige leden beneden de leeftijd van 21 jaar en werkloze leden betalen aan de algemene kas bijdragen, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting worden vastgesteld „ ; art. 60 alinea 2 leze men aldus „ De afdelingen betalen zo spoedig mogelijk van de ingekomen gelden van iedere afdelingsbegünstiger aan de algemene kas een bijdrage, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting wordt vastgesteld ; art. 72 leze men aldus „ De vereniging geeft een orgaan uit, genaamd „ Nederlandse Esperantisto „ , dat gratis en franco aan alle leden wordt toegezonden. „

Pri miskompreno kaj donacantoj

Sekve de iu eraro aŭ miskompreno sekcio Boskoop de L.E.E.N. ricevis 12 ekzemplerojn de « De Esperantist », kiujn ĝi ne bezonas. Kion fari ? Estus domaĝe, lasi la gazetojn en la ŝranko kaj ne disponi ilin. Tial ni elektis dekdou de adresoj de personoj, pri kiuj ni opiniis, ke ili ne estas malfavoraj al nia ideo. Ni forsendis al ili la superfluaĵn numeron kun akompana letero, en kiu ni petis ilin legi la gazeton kaj fariĝi donacanto. Poste ni vizitis la koncernajn personojn kaj jen la rezultato : 8 novaj donacantoj. Ne estas sorĉaĵo, varbi donacantojn por nia asocio ; ni postulas malmulton — nur unu guldenon en jaro — kaj donas multon — 4 numerojn de « De Esperantist ». Kun iom da kuraĝo kaj oferante kelkajn liberajn vesperojn ni ĉiuj certe povos duobligi la nombron da donacantoj.

Sekcio Boskoop (ĝi havas 7 anojn) nun estas kun siaj 30 donacantoj « hidrocefala sekcieto », sed tio ne gravas !
 W.W.

No So BE bezonas helpo !

Por ebligi daŭran eldonon de la brajla organo « Kontakto », kiu estas legata ne nur en Nederlando sed ankaŭ en pluraj aliaj landoj, No So BE (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj) aranĝos loterion ĉe kiu ĝi kalkulas je la helpo de ĉiuj vidantaj gesamideoj. La lotio estas liverataj en libroto, kiuj enhavas 60 lotojn po g. 0,10. Kompreneble ĉiu sekcio tuj mendos tian libroton ĉe s-ro A. Baerveldt, Schippersstraat 31, Rotterdam-West kaj disvendos la lotojn al la anoj kaj al ĉiuj personoj, kiuj pretas oferi g. 0,10 por helpi niajn blindajn samideanojn. Event. nevenditajn lotbiletojn oni povos resendi. Pagoj per postkonto 1838.

EXAMEN-UITSLAGEN

AMSTERDAM, 18 Mei 1950 :
 Aangemeld voor examen B. 6 kandidaten, opgekomen 6, geslaagd 4 : mev. H.E. te Strake-Loefers te Driebergen en de heren E.A. Burk en J. Rooker te Amsterdam en B.J. Walker te Haarlem.
 Aangemeld voor examen A. 50 kandidaten, opgekomen 47, geslaagd 32 : de dames M.H. Hoogberg-Helenius te Alkmaar, N.C.v.d. Berg te Amersfoort, J.C.B. Burbach, J.M.C.v. Homort-Remmers, J.M.v.d. Heyden-v. Herwerden en A.J. Schol te Amsterdam, E.J.v.d. Aardweg, V. ter Braake-Saritsky en H. Joosten te Haarlem, E.J. Vermeulen te Heemstede, H.B. Draijer te Velp.

M.v.d. Meydon-Kroes en G.v. Streun te Zeist en de heren G.P. Agterdenbos, F. Burbach, G. Clobus, J.G.de Goede, P.F.H. ten Have, Th. Muys, D. Post, H. Sollie, W.v. Vliet en J. H. ter Voort te Amsterdam, F. Prak te Arnhem, P.J. Slagt te Beemster, P.G. Provoost te Eindhoven, J.C. Beltzer en J.A. Chiteur te Haarlem, B. Kroes te Utrecht, J.H. Draijer te Velp, J. Litz te Vianen en N.J. Schoonheim te Zuilen.
 ZWOLLE, 18 Mei 1950 :
 Aangemeld voor examen B. 7 kandidaten, opgekomen 6, geslaagd 5 : de dames H. Houwink-v.d. Bos en E.H. Zondervan-Visser te Deventer en J.H. ter Braak te Zwolle en de heren J. Nijkamp te Deventer en J.H. Keyzer te Hengelo (Gld.)

Aangemeld voor examen A. 22 kandidaten, opgekomen 22, geslaagd 14 : de dames M.E.v. Nugteren te Doetinchem, A. Jagtenberg te Groningen, H.C.v. Assen te Hengelo, N.A.v.d. Hoek en D. Paul te Leeuwarden, E. Brandsma-Leenman en A. Zwartepoorte te Zwolle en de heren U. Smid en H. Worms te Groningen, J.W.v.d. Berg te Hengelo, K. Waterbolk te Leeuwarden, J. Jongma te Meldam, J.H. Brevoord en P. de Wit te Zwolle.
 ALKMAAR, 10 Juni 1950 :

Aangemeld voor examen A. 14 kandidaten, opgekomen 14, geslaagd 7 : de heren J. Buisink, G.J. Franssen en A.J. Praat te Alkmaar, F.J. Feijen en C. Schotten te Bergen, L.N. Commandeur te Hoer-Hugowaard en A.A. Delis te Spierdijk.

DEN HAAG, 10 Juni 1950 :
 Aangemeld voor examen B. 6 kandidaten, opgekomen 6, geslaagd 3 : de dame C.A. Mol te Den Haag en A.v.d. Heyden te Hintham-Rosmalen en de heer N.Z. Dijkhoff te Bergen op Zoom.
 Aangemeld voor examen A. 31 kandidaten, opgekomen 29, geslaagd 16 : de dames F.v.d. Linde-de Vries te Amsterdam, A.v.d. Eijk-Bierens te Dordrecht, L.A.M. Goudesoune en T.L.A. Marinus te Eindhoven, J.M. Alsem-Steegers te Den Haag, M.T.v. Corstjan te Haarlem, M. Kerk-Plaggenmarts te Hoornstede, W.P.F. Kipping-v. Lent en C.J.M. Krijnen te 's Hertogenbosch, E.C. Kater te Rotterdam en J.J. Nieuwland-Langendoen te Woerden en de heren H.N. Spruyt te Gouda, A.v.d. Heij, D.W.F. Holland en D.J. Waltman te Den Haag en F.J.E. Tichelman te Zeist.

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ nederlanda (= mezeŭropa) hor sistemo. Flandroj kaj aliaj Greenwich-tempanoj bonvolu depreni unu horon.

| | |
|--|---|
| Mallongigoj : I = informoj, P = parolad(et)o, K = kurso. | |
| Ciutage | 15.45-16.00 Prago, 25,51 m. : I. 19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : I kaj P. 22.00-22.15 Prago, 31,41 m. : I. |
| Dimanĉe | 9.00, 11.00 kaj 13.00 « Nigra Stacio », 47 m. : Gram. 17.00-17.20 Romo, 19 m., 25 m. : I kaj muziko. |
| Lunde | 6.30- 6.35 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 513 m. : I. 17.30-18.00 Rio de Janeiro, 375 m. : 30,71 m. : K. 22.50-23.00 Prago, 470 m., 315 m. : I kaj P. |
| Marde | 12.55-13.00 Berno, 31,46 m. ; 48,66 m. : P. de d-ro Arthur Baur. 18.40 18.45 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo. |
| Merkrede | 0.45- 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I. 18.00-18.20 Lille, 235 m. : P. (Nur ĉiuduamerkrede : 7 kaj 21 VI, 5 kaj 19 VII k.t.p.). 20.15-20.30 Varŝavo III, 48,23 m. t I. 22.50-23.00 Prago, 470 m. : I kaj P. 23.00-23.45 Prago, 470 m., 315 m. : « La Verda Stacio » dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon !! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato). |
| Ĵaŭde | 12.55-13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj paco. 15.30-15.45 Graz (Alpland), 240 m. : K. de prof. Hainschegg. (Nur la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato). 18.40-18.45 Berno, 31,36 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo. |
| Vendrede | 9.05- 9.20 Parizo, 347 m. : K. (Nur ĉiuduavendrede). 16.40-16.55 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 203 m. : I. (Nur ĉiuduavendrede). 16.45.-17.00 Hilversum II, N.C.R.V., 298 m. : P. (Nur unufoje en 5 aŭ 8 semajnoj). 25-VIII-1950 : H. A. de Hoog. 17.00-17.20 Romo, 19 m., 25 m. : I kaj muziko. |
| Sabate | 23.15 Hilversum, 298 m. : I. |

INFORMOJ KAJ PETOJ :

Esperanto-silentmaj stacioj. — Pluraj stacioj, kiuj regule aŭ ofte elsendis programaron en aŭ pri Esperanto, nun provizore (ĉu definitive ?) ĉesigis tiajn elsendojn. Ni nomas la staciojn Budapeŝto, Munĥeno-Nurnbergo, Parizo kaj Stokholmo. Necesas sendi al tiuj stacioj peton, eĉ nur per karto, pri reokazigo de tiaj elsendoj. La Esperantistoj havas la elsendojn, kiujn ili meritas.
 Denove du Esperanton elsendantaj stacioj. — Ni speciale atentigas la radio-aŭskultantojn pri tri novaj stacioj en la supra listo : Romo (dimanĉe kaj vendrede) Lille (ĉiuduamerkrede), Hilversum (Sabate) kiuj ankaŭ antaŭ la milito regule sendis Esperanto-programaron en la eteron.
 Jen la adresoj por sendi skriban aplaudon :
 Radiodiffusione per l' Estero : Esperanto, Via Veneto 56, ROMA - Italujo.
 Radiodiffusion Française, LILLE (Nord) — Francujo.
 K.R.O. Emmastr. 52, Hilversum (Ned.).
 Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al : Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

MEJLOSTONO 1950

La estraro de la nacia ekspozicio « Mejlostono 1950 » en Arnhem presigis laŭ instigo de la « Arnhema kunlaborkomitato » esperantlingvan cirkuleron kun informoj pri la ekspozicio ; la cirkuleron oni dissendis al ĉiuj sekcioj de niaj Esperanto-asocioj. La partoprenontoj en la someraj kursoj en « Oolgaardthuis » (Arnhem) faros ekskurson al « Mejlostono », sed sendube ankaŭ multaj aliaj ĉi-somere iros al Arnhem, por viziti la ekspozicion.

F.I.L.E. KONGRESO 1950

(daŭrigo de p. 1.)

Aŭdiĝas subite kaj daŭre tondro-simila bruado super niaj kapoj tiel ke apeŝaŭ oni komprenas la paroladistojn kaj ke kelkaj gekongresanoj eĉ vekigis kaŭze de tio. Post esploro de bonvolemlulo evidentiĝis ke en supra salono okazis ankaŭ kunveno sed verŝajne de ne pacema organizo.

La lasta punkto sur la jarkunvena tagordo tutkompreneble estis la propono de rezolucio. Ĉi-jare ni estis aŭdege kaj interkonsentis pri sendado de 2 rezolucioj.

1. al la Ministerio de Publika Instruado ĝi tekstas jene : « La anoj de la Flandra Ligo Esperantista, dum ĝenerala kongreso en Oostende, la 28.5.50 ;

Eksciinte la enhavon de la letero de la Ministro de Publika Instruado d.d. 20.3.50 JB/MD ;

Konsiderante ke la paroladoj estus planitaj en la kadro de la liberaj distro-posttagmezoj kaj sekve tute ne ĝenus la normalan funkciadon de la lecionoj ;

Insistas pri la revizio de la prenita decido, kaj rememorigas sian deziron por la permeso de la proponitaj paroladoj. »

2. al la Ministro de P.T.T. por ke li bonvolu transdoni la rezolucion al la Internacia kongreso de la Monda Poŝta Unuiĝo kies kongreso okazos en Brussel « La anoj de la Flandra Ligo Esperantista dum kongreso en Oostende ;

Konsiderante ke la okazonta kongreso de la Monda Poŝta Unuiĝo estos organizata en Brussel ;

Ke tiu kunveno rajtas decidi pri ŝanĝoj al la internacia respondkuponjo ;

Konsiderante la fakton ke Esperanto estas disvastigita en la tuta mondo kaj multfoje uzata en internaciaj interrilatoj ;

Petas la Ministraro de P.T.T. por ke li bonvolu proponi ke ankaŭ la Esperanto-traduko de la fiksita teksto, estu presita sur la internaciaj respondkuponjo.

Drs Roose per trafa parolo fermis la kunvenon.

Poste la kutima fotografado sur la majesta ŝtuparo de la juĝeja konstruaĵo.

Intertempe jam malfruigis, kaj la stomaĝoj komencis protesti pro la fastado, do ĉiuj rapidis al la hotelo, kie la tabloj jam estis pretigitaj por abunda tagmango. Bone preparitaj mangaĝoj, freŝa vento ekstere, malplena stomako interne, faris tiun tagmangon granda sukceso, post kio iom da ripozo estis tre bonvena. Tamen nin atendis ankoraŭ promenado sur la digo kaj vizito al la modernegaj baninstalaĵoj, kiuj kompreneble ankoraŭ ne estis en plena ekspluatado, kvankam jam kelkaj kuraĝuloj spitis la malvarmajn venton kaj akvon. En trankvilo oni do povis preni la tempon por rigardi la vere tre praktikan arangon de tiuj instalaĵoj, kiuj en plena sezono ebligas ĉiuhore al naŭcent personoj sin senvestigi kaj ree sin vesti. Tiuj vizitadoj kaj posta promenado tra kelkaj parkoj kostis tiom da tempo, ke la planita estrarkunveno ne plu povis okazi, kaj estis prokrastata ĝis pli konvena horo.

Multe da tempo ne plu restis antaŭ la komenco de la festvespero. D-ro Manders, la nun jam fama verkisto, kaj propagandisto intertempe alvenis, kaj iom post la oka horo preskaŭ ĉiuj ĉeestis en la festsalono por aŭskulti lian paroladon, kiu antaŭis la festan parton de tiu vespero. Kvankam D-ro Manders estas fervora esperantisto, li ne fermas la okulojn por la ankoraŭ venkotaj malfacilaĵoj, kaj li ne timas indiki la mankojn de Esperanto, se li juĝas tion necesa. Laŭta aplaŭdo rekompencis la parolinton por lia treege interesa klarigo de temoj, pri kiuj oni ne ĉiutage aŭdas paroli tiom kompetentan scienculon.

Kiel preskaŭ kutime en la lastaj jaroj la bruga grupo denove prizorgis la teatran parton de la kongreso. Ĉi tiun fojon ili riskis teatraĵon, kiu plenis la tutan vesperon. Kvankam unu el la aktoroj subite malsaniĝis, kaj devis esti anstataŭata, la prezentado tamen ne suferis pro tio, kaj la streĉo, videbla sur ĉies vizaĝo, pruvis ke ĉiuj bone komprenis la detektivan romanon, pri kio oni ne bezonas miri, ĉar la aktoroj vere vivis en siaj roloj, kaj sufloron oni ne aŭdis. Estas domaĝe, ke ĉiuj penadoj kaj streĉoj de tiu grupo ĉiam nur unu fojon povas esti rekompencataj per la aplaŭdo de la aŭskultantoj. Ili vere meritas pli, kaj oni nur povas esperi, ke ne lastafoje, ili regalas nin tiel.

Tiun vesperon oni feliĉe, ne tiom malfruis, kiom la antaŭan, kaj tute freŝa la postan matenon oni atendis la surmaran ekskurson. Kvankam la vento ne plu estis tiom forta, tamen evidentiĝis ke kelkaj iam eble pli ŝatis la ludalon fare de siaj patrinoj ol nun tiun de la ondoj. Nur la fiŝoj profitis de tio. Sed albordiginte la viktimoj baldaŭ forgesis tion kaj kuraĝe sekvis la gvidanton al la Thermaal Instituto. Ĉar, ni iom tro frue alvenis, ni uzis la tempon por preterpase viziti la folkloran muzeon, kie kelkfoje la tre spritaj desegnaĵoj multe gajigis la vizitantojn. La vizito al la Thermaal Instituto daŭris sufiĉe longe, ĉar la ĝenerala interesiĝo estis tre granda, kaj la gvidantino, kiu ne parolis esperanton, ofte klarigis ĉion dufoje en franca kaj en angla lingvoj.

« Ne-speciala » tramo poste kondukis nin al la aliflanka ĉirkaŭaĵo de Oostende, kie ni komforte ĝisnias nun lunĉon. Bela promenado tra la dunoj estis la fino de la posttagmezo, kaj ni ankoraŭ en granda aro por la lasta fojo kunvenis en nia hotelo por adiaŭi ; kontraŭ la kutimo neniu rapidis por foriri, pruvo ke oni kiom eble plej longe deziris forŝovi la momenton de disigo.

La adiaŭa ne estis tumulta sed silenta, preskaŭ ne perceptebla, kiel decas cetero kiam oni forlasas lokon kie oni dum 3 tagoj sin trovis en mondo pli taŭga kaj pli kamarada el la ĉiutaga : en mondo de la Esperantistoj. Mi nome de ĉiuj gepartoprenintoj ekkrias : Dankon al la sekcio Oostende, kiu kontentige kaj sukcese aranĝis la 15-an. Ili faris sian eblon, kaj ili prezentis pli ol la atenditan ; vivu la 16-a, en kiu ajn loko de nia kara Flandrujo ĝi ja okazos !
 Ĉeestinto

REDAKCIAJ SCIIGOJ

Ĉi tiu numero aperas ĉ. la 15-a de julio, pro la libertempo. La venonta nro, tiu de septembro, estos en viaj manoj komence de la monato.

Ni atentigas ĉiujn interesatojn ke manuskripto devas esti en nia posedo plej laste la 10-an de ĉiu monato.

En nia venonta nro ni komencos la publikigon de 3 artikoloj de Dro W. Manders pri lingvistikaj temoj, ĉerpitaj el la prelego, kiun la konata filologo faris okaze de la Kongreso de F.L.L.E. Ni certas ke niaj legantoj taksos laŭ ĝia ĝusta valoro la kontribuojn de la originala kaj meritplena aŭtoro de « Vijf Kunsttalen » kaj « Interlingvistiko kaj Esperantologio ».

ESPERANTO EN BELA REVUO

La revuo de la federacio de brabantaj Fremdultrafikaj asocioj, jam uzis nian lingvonon du el siaj numeroj. La organo estas presita en pluraj koloroj. Ĝi uzas plej parte la nederlandan lingvonon, sed ĝi aplikas ankaŭ aliajn. La ĉefartikolo de no. 2 estas en Esperanto kaj en la nederlanda lingvo. Ĝi temas pri la brabantaj pafistgildoj. La titolo estas « Jarcen-taĝa institucio revivadas ». Senpagaj numeroj ĉe : « Verkeershuis », Dommelstraat 27, Eindhoven, Nederlando.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION akiras por VEB post n-roj 85-86 : F-ino Boute, C. el Blankenberge, kaj por LEEN : s-ino A. M. v. d. Wal-Brethouwer el Arnhem.

SOLVOJ.

N-ro 87. Horiz. 1. dediĉi; Brust. 2. enu. 3. paser; frand. 4. por. 5. acid; klaĉ. 6. elkor. 7. apog; ekig. 8. memstar. 9. opal; joke. 10. pri/pro. 11. emoci; notit.

Vert. 1. apoge; 2. emancip. 3. omaro. 4. degel. 5. ĉerp; pi. 6. orkestr. 7. bufr; in/on. 8. kreaĵ. 9. kroat. 10. sensaci. 11. greft.

N-ro 88. dorso; sojlo; cejano; koloso; juĝejo; lumturo; pejzaĝo; presejo; tereĝo; unuanime; kapdoloro; motoristo; negocisto; naskiĝtago; malsanulejo.

Goju, goju ni, kolegoj,
Dum ni junaj estas;
Post plezura estanteco,
Post malgaja maljuneco,
Sole tero restas.

N-ro 89 : KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. maldika etenditaĵo da substanco (R); malokupi (R). 2. parto de okulo (R); ĝi signalas danĝeran lokon por ŝipoj (R); difekti per longa uzado (R). 3. trinkaĵo (R); konkurso (R); pagi por la uzado (R). 4. participa finaĵo (R); koloro (R); senti sur-

| | | | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 1 | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | | |
| 11 | | | | | | | | | | | |
| 12 | | | | | | | | | | | |

prizon por io stranga (R). 5. sonanta malklare, kvazaŭ skrapante (R); persona pronomo; 6. malmoliginta loko en la haŭto (R); naiva amo (R). 7. montri preferon per voĉdonado (R); movi ion al si (R). 8. trovi la tempon longa (R); ludtermino el la kartludado (R). 9. etendaĵo de akvo (R); arboriĉa promenejo (R); manĝebla radiko (R). 10. inklino (R); homo per kies helpo oni traktas aferojn kun aliaj personoj (R); prepozicio. 11. havanta elstaran inteligenton (R); ne nur sed plie; statuo de nevera dio (R). 12. laboro (R); ĝi disvolvas fizikan lertecon kaj samtempe amuzas (R).

Vertikale. 1. honora nomo (R); prizorgi malsanulon. 2. loko por bataloj kaj ludoj (R); konjunkcio; ĝi estas uzata por rigidigi tolaĵon (R). 3. persona pronomo; legi ĝis la fino (R); malkonfesi (R). 4. substanco en la korpo (R); ilo de ŝuisto (R); speco de ludkartoj (R). 5. nombro; parto de vagono (R). 6. artefarita ŝtono (R); grupe; 7. ĝi ŝirmas la fingron (R); eljeti el la buŝo (R). 8. floro (R); ŝvelaĵeto sur la haŭto (R). 9. malfalsa (R); mezurilo (R); ideala modelo (R). 10. ekstrema flanko de konstruaĵo (R); nombro (R); konjunkcio. 11. ĉina laboristo (R); moviĝi (R); amegi (R). 12. senrajte proprigi al si (R); speco de tritiko (R).

N-ro 90 : ALDONU

du literojn al ĉiu el la sekvantaj vortoj, por formi novajn nekunmetitajn kaj senafiksajn. La duaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, montras proverbon.

Rando; omaĝo; medio; ringo; arabo; akcio; najlo; ero; trono; ordo; ostro; rekta; kordo; plori; rabi; stelo; korto; timi; fendi; flamo; mono; konto; gusto; esti; misio.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro Teunissen Burg, Iellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 10.8.50.

Nacia — flandra — aŭtoro rilatis kun samideanoj

de Tyne Verum

(daŭrigo)

«La Esperanto-literaturon mi dum la okupado devis enŝlosi kiel nedeziratan. Esperanto kaj Teozofio montriĝinte danĝeraj en la nova socio devis esti metataj en la «inferon», ĉe la reston, ĉar ĉiam ekzistis ankaŭ por la spirito koncentroj... Sed tio estas alia historio... Inter la du militoj okazis en Antverpeno Esperantokongreso internacia. Ĝi malfermiĝis Dimanĉon. Sed jam dum la antaŭa tago kongresanoj, rekoneblaj al la verda stelo en la bulontruo, pasis tra Keyserlei kaj Meir. Je bela vespero mi promenis hejmen laŭ la bulvaroj senhomaj. Subite apud la sankta Virgulina kolegio viro leviĝis de benko kaj ion al mi demandis. Mi ne komprenis lin kaj li ripetis sian demandon. Kion li ja volas? Li senhalte murmuris. Mi demandis al li en la angla, la germana, plie en la franca kion li volas. Ne ombro de ŝanco ke li min komprenis. Tiam mi voĉe pensis, kun blasfemeto en la kara patrolingvo:

— Sed ulo mi dezirus ke mi vin komprenu!

Al kio la viro en pure nederlanda respondis:

— Mi serĉas la vojon al hotelo Dijksterhuis...

— Kaj kial?...

— Nu, mi estas ĉi tie por la Esperantokongreso kaj pensis...

Per drasta esprimo mi lin malafablis, preta lin sendi al la diablo. Sed mi tamen montris al li la vojon.»

Kiu en nuna skeptika tempo ne melankolie memoras tian tiom tedan kiom kortuŝan samideanon? Eble la aŭtoro estus kompreninta lin, se li estus bone parolinta... Liaj posteuloj ne plu fuŝparolas: — ili silentas.

«Lunde s-ro De Wagenaere venis al mi akompanata de malgranda ĉino... Estis ĵurnalisto, studvojaĝanta en Eŭropo, ido de la naciisma revolucio. Li rekte venis el Parizo, kie li sekvis kelkajn lecionojn en la Sorbonne, kiel konvinkta Esperantisto al tiu kongreso. La batalo de la Flandroj por ilia memstareco estis problemo, kiu lin okupis. Do ili siĉis antaŭ mi kaj De Wagenaere estus la interpretisto. Mi ja komprenis la demandojn aŭ ilin divenis, sed miajn respondojn mi formulis singlarde kaj ĉiun tradukigis. Ĉar mi jam lernis pri ĵurnalistoj, ke post domaĝo venas saĝo. Kaj la ĵuna ĉino tiel diligente notis ĉion! Mi ne fidis, kion li kapablis distili el miaj respondoj. Mia tempo estis limigita... Ni interkonsentis, ke li vespere vizitu min hejme. Tiam mi disponis pri mia tuta tempo kaj, kvankam la aktoro ne povos ĉeesti, ni tamen kapablos interparoli pere de la angla, kiun ni ambaŭ neperfekte scipovas.

La ĉino trovis mian hejmon kaj pasi-

gis duonan vesperon en mia studoĉambro. Mia edzino pretigis teon. Li faris komplimenton al ŝi; ĉu estis orienta ĝentileco? Lia angla tre hezite delipiĝis en strangaj frazoj kaj mi sentis min preskaŭ la pliforta.

Ekmontriĝis ke oni en Sangajo multe interesiĝis pri ĉi tiaj okazintaĵoj dum la okupado en 1914-18, dediĉis artikolojn al Aktivismo kaj flandraj postuloj... Li atente aŭskultis, notis, promesis al mi sendi gazetojn en kiuj liaj artikoloj aperos...

La postan tagon li denove venis al la biblioteko ĉe la ferma horo. Li volis foton de ni ambaŭ kaj oficisto furis ĝin antaŭ la enirejo. Vespere li forvojaĝis re al Parizo kaj unu semajnon poste mi ricevis kopiaĵon...

Poste mi ne plu aŭdis pri la ĉino. Mi ne ricevis gazetojn. La eta foto staras jam multajn jarojn en mia laborejo, — saluto el la vasta mondo

To Mr. Lode Bekelmans
Memorial from Iu Yne Tse

4.VIII.28

Kia estis la sorto de mia ĉino en la ĉina ŝaoso? Ĉu li restis ĵurnalisto aŭ ĉu li iĝis generalo? Ĉu li ja ekmemoris pri la antverpena teo kaj siaj renkontiĝoj kun la ĉi tiaj okcidentanoj? La memoro de homo ofte estas Danaidujo, sed ne ĉiam. Kaj se li aperigis sian intervjuon, kia miriga rakonto ĝi tiam eble estis. Sed verŝajne li falis en la senfina batalo por renovigo de socio kaj vivo en la ŝaoso de Ĉinujo.»

Jes, kara leganto, estus interese se ni povus informi la flandran aŭtoron pri la sorto de nia ĉina samideano Iu Yne Tse, kiun li post dudek jaroj ne ankoraŭ forgesis...

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume: g. 1.— aŭ bfr. 15.—

Dezirata interŝanĝi p.m. kaj bildkartojn kaj aŭ nur korespondi kun flandra Esperantisto : Radoslav Dohnal, Vojice 79, C S R, p. Podhorn Ujezd.

Ljuhen Uzunov deziras korespondi kaj interŝanĝi jubileajn p.m. kaj ilustritajn kartojn. Adreso : st. «Iskar» 2-a, Burgas, Bulgarujo.

Dezirata aĉeti la elĉerpitan vortaron «Beknopt Esperanto-woordenboek» Van Straaten. Ofertu al : F-ino Clauwaert, Waterwerkstr. 20, Oostende.

Miloslav Sinkora, 19-jara gimnaziano, adreso Pribenicka 738, Tabor, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi per poŝtkartoj.



«Esperanto in der Tasche.» Verkis Wilhelm kaj Hans Wingen. Lingve aprobita de la Lingva Sekcio de G.E.A. Eldonis Verlag der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, 1950. Broŝ. 44 p.; 12 x 23.

Ĉi tiun verketon akompanas la deziro de la aŭtoroj, ke ĝi profitigu ĉiun. La konciza sed sufiĉe komplete gramatiko (germanlingva) ebligu la ne-esperantistojn tuj trastudi la ĉefan parton : la Esperanto-konversacion. Dum la progresintoj avantaĝe iom revivigu iom velkintan teoriant scion antaŭ ol plej rapide proprigi al si parolturnojn kaj vortojn sen kiuj praktike la plej simpla konversacio ne estas imagebla.

Kvankam persistema studento ne-esperantista sur tiu vojo sendube sukcesus estru bazan konon de Esperanto, estus prudente pripensiti, ke tro peniga metodo fortimigas la interesatojn, ke ĝenerale ĝi ne avantaĝe anstataŭas la paŝo-post-paŝan enkondukon en novan lingvon.

Sed konsiderinde helpas la frazaro al progresintoj. Elementa kurso ja jam kutimigis ilin al la specialaj gramatikaj; ne malofte mankas nur la konvenaj esprimoj el kiuj konstruigas gentila, eleganta, vivanta interparolo en simpla ĉiutaga societa vivo; ne malofte mankas la ĝusta vorto por ĉiutage uzata objekto. Nur pro tio, ke lernolibro apenaŭ aŭ ne bezonis tiujn vortojn por ilustriti la sekretojn de sintakso aŭ vortformado.

Riĉan, praktikan, zorge elektitan sortimenton de frazoj kaj vortoj provizas la libreto en artikoloj oportune grupigitaj la vortmaterialon ĉirkaŭ centra ideo kia : vojaĝo, hotelo, manĝoj, poŝto, magazenoj, amuzoj, k.s. En fidinda, natura lingvo. Plejeblo Zamenhova, aŭ plejeblo komune uzata. Almenaŭ kiam la konstanta enpenetro de teknikaj terminoj en la nunan vivon ne postulis alprenon de apenaŭ eviteblaj neologismoj : bovlo (24), tablojdo (34), jerzo (36), aroki, mato, rodli (42), superheto (43), k.a.

Eble ne necesis «remburso (32)» (poŝtrepago), kaj neklare impresas la tre ĝeneralaj «ŝmiraĵo (34)» (ungvento), «seĝego (37)» (brakseĝo, fotelo), «tubo (43)» (aertubo), «dramejo, filmejo (29)» (teatro, kinejo); kaj la malpli precizajn «acida brasiko (24), konektilo (37), venkobato (41)» ankoraŭ ne anstataŭis la pli novaj «saŭrkraŭto, ŝaltilo, nokaŭto».

Pro tiu sama precizo, «dankema (19), ĉirkaŭ la angulon (19), pluspago (20), apudaj ĉambroj (21), tranĉaĵo kun ŝinko (23), pasintan semajnon (26), malĵuna (27), mi ne havas sufiĉe da mono ĉe mi (36)» malpli kontentigas ol : «danka, preter, alpago/ekstrapago, sintuŝaj, de ŝinko, la pasintan, aĝa, kun mi».

Male, «pundo» (angla mono) apartigas sin de «funto» (pezo).

La angladevena «ĝazbando» perdis sian laŭprononcan ortografion kaj elmergiĝas kiel «jazbando».

Mirigas la plurfoja uzado — cetere ne konsekvenca — de «rajti» en la seneco de : havi la permeson de la alparolito. Ekz. : «Ĉu mi rajtas akompani vin?» Dum ankaŭ «povi» troviĝas samsence ekz. : «Ĉu mi povas malfermi la fenestron?», kie en tio oni sekvas la komunan uzadon. Influo de la gepatra kulpas pri : «Rekomendu min al sinjorino via edzino (15)» kaj «Mi estas volonte preta... (17)» por : «(Bonvolu transdoni) miajn respektajn komplimentojn al...» kaj «Mi volonte...».

La nete kaj zorge presita poŝformata broŝuro «Esperanto en la poŝo» estas unuoloke destinita al germanoj : la Esperanto-traduko apudas la germanan tekston. Sed ankaŭ al ailingvanoj ĝi estas varme rekomendinda : ili danke kaj parolturnoj kaj pli memfide transĉerpos el tiu sistema kolekto de praktipaŝos al la konversacio.

Fr. C.

La Nova Erao de la Tutmondeco» kaj «Esperanto» de M. A. Teixeira de Freitas, trad. Prof. Porto carreiro neto, Rio de Janeiro, presejo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. — 1948 26 p. — Havebla ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praça de República, 54-1^o, Rio de Janeiro : 5 resp. kup.

«En agrablaj kunveno, sub la alta patronado kaj la severa juĝo de la militistaj klasoj» (brazilaj) la direktoro de la departemento de statistiko de la Edukado kaj Publika Sano, konigis per altflugaĵo periodoj «la veran socian, ekonomian, kulturalan kaj ankaŭ praktikan amplekson de la Esperanto-movado.»

La tradukinto ege fidele redonis ĉiujn nuancojn de tiu impona parolado, kies legadon ni rekomendamas al niaj idealismaj kaj praktikaj legantoj, kiuj trovas en ĝi pripensindajn ideojn kaj vidpunktojn.

TYN.

UNO's great need, an international auxiliary language, anglalingva 20-paĝa broŝuro de A. J. Sinclair, enhavanta artikolon «Esperanto, the only living international language» kaj (en Esperanto

kaj angla lingvoj) artikolon de d-ro I. Lapenna pri la kongreso en Bourne-mouth. Eld. : Rotary club of The Awamutu, New Zealand. Prezo ne montrita.

Kion diris la majstro? ; 4-paĝa flugfolio kun citaĵoj el la paroladoj de d-ro L. L. Zamenhof. Eld. : Rotary club of Te Awamutu, New Zealand. Prezo ne montrita.

«Resumo de la plano de tutmonda popola delegitaro» kaj «Monda Federacio»; du 4-paĝaj flugfolioj; ambaŭ kune kontraŭ unu respondokuponon haveblaj ĉe 22 Standish Road, London W 6.

Bonvenon en Ravensburgo! provizora il. prospekto pri la «koro de la ŝvaba Oberlando». Havebla ĉe : Trafik-ofico urba, Ravensburg, Württ. Germanujo.

Touring Club Italiano, presita 4-paĝa faldfolio en Esperanto pri Itala Turisma Klubo (375.000 Membroj), kun informoj pri aliĝo, eldonaĵoj multnombraj (gvidlibroj, kartoj ktp). Havebla ĉe : T.C.I. Corso Italia, 10, Milano, Italujo.

Ĉu socialisma libereco aŭ kapitalisma servuteco? de Daniel De Leon, distribuita de SAT, 67, Avenue Gambetta, Paris (20), Francujo. 1950, 31 p. Recenzota.

Jeugherberggids 1950, uitg. Vlaamse Jeugherbergcentrale, Antwerpen, 1950, 112 blz. Te bespreken.

Ilustrita poŝtkarto kvarkolora, kun emblema bildo de SAT, sur la adresa flanko, 105 x 148 mm.; prezo : 8 fr.fr. por ekz. Havebla ĉe SAT, 67, avenue Gambetta, Paris (20), Francujo.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — Afdeling Brugge. Wij zijn eindelijk in het bezit van de Esperantofilm over Denemarken. Wij zijn van plan hem te vertonen, ten titel van propaganda voor een publiek van belangstellenden niet-Esperantisten; een tweede vertoning wordt ook voorzien : daarop zouden de aangesloten afdelingen onzer provincie uitgenodigd worden.

ESPERANTO-DAG TE BRUGGE

Alle Vlaamse Esperantisten zijn welkom te Brugge op Zondag, 30 Juli e.k. Een Esperanto-dag zal er ingericht worden door de plaatselijke afdeling, met op het agenda het projecteren van de Deense Esperantofilm, een gemeenschappelijk middagmaal, een boottochtje op de reien en gezellig samenzijn, enz... Er wordt voornamelijk gerekend op de West-Vlaamse Esperantisten!

Diegene die aan het middagmaal wensen deel te nemen gelieven zo spoedig mogelijk hun naam op te geven aan sekretaris : R. Iserentant, Steenweg op Blankenberge, 76, Brugge.

Aurzel niet, het wordt stellig een gezellige dag!

L.E.E.N. — Deventer. La 18-an de junio la lokaj sekcioj de F.L.E. kaj L.E.E. N. en Deventer aranĝis bone sukcesintan «verdant dimanĉon», kiun ĉeestis proks. 60 esperantistoj el Deventer kaj aliaj lokoj. Prelegis s-ro G. J. Degenkamp pri «la eterna konflikto» kaj s-ro S. Pragnaŭ pri la Esperanto-vivo en Rumanujo antaŭ proks. 20 jaroj. La programo krome menciis promenadon, komunan lunĉon, muzikon, kantojn kaj teatraĵeton.

V.E.B. — Afdeling Gent. Mei stond in het teken van de ansicht-avond (31.5.50). Het aantal zendingen steeg geweldig zodat wij in het totaal 115 zendingen ontvingen uit 21 landen (Oostenrijk, Engeland, Tchecho-Slowakije, Denemarken, Finland, Duitsland, Frankrijk, Spanje, Hongarije, Ierland, Nederland, Noorwegen, Portugal, Polen, Schotland, Zweden, Zwitserland, U.S.A., Joegoslavië, Saarland, Italië. Het resultaat van deze avond werd eveneens in de radio — zendstation Gent — bekendgemaakt.

L.E.E.N. — Leeuwarden. Sabaton la 20-an de majo Frisa Esperantista Rondo festis sian lastan antaŭsomerman kunvenon, al kiu ankaŭ la anoj de la loka F.L.E.-sekcio kaj la lernantoj de la seminaro estis invitataj. La tutan programon, konsistantan el skeĉoj, muziko klasika kaj moderna kaj balo sub gvidado de la «Ekstazo-Kvinteto», prezentis la junulargrupo Ekstazo, subsecio de F.E.R. La sukceso estas por Ekstazo instigo, prezenti plurajn tiajn kabaredprogramojn.

Biciklaj ekskursoj okazos 15-7-1950 al Wiewerd kaj 29-7-1950 al Franeker. Forveturo de «Lange Pijp» je la 14-a horo.

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnestraat 38, Turnhout.